

Radio Ĉerizo 7

2011-02-07

Radio Ĉerizo parolas hodiaŭ pri edukado. S-ro (sinjoro) K. rakontis al mi sian sperton.

Kiam s-ro K. sidis sur tramo, iu fraŭlino eniris en ĝi, kun poŝtelefono, senĉese parol-ante. Tiam la tramo estis ne multehoma, kaj ŝi kontinuis, daŭrigis sian paroladon en ne granda voĉo. Pasaĝeroj toleris kontraŭ tio longe, tamen la telefonparolado ne ĉesiĝis. Ĝuste tiam tramanonco diris, ke oni ne telefonu en tramo pro ĝeno al aliuloj.

Finfine iu viro, pli ol 40 (kvardek)-jaraĝa, ne tolere diris al ŝi. “Ne telefonu ĉi tie! Ŝajnas, ke aliaj pasaĝeroj estas senvoĉaj, sed ĝenitaj pro vi!”

Ŝi ĉesis poŝtelefonadon, sed rigardis lian vizaĝon kun koleraj okuloj. Kompreneble pli incitiĝis la ĝentila sinjoro.

Post tio, s-ro(sinjoro) K. estis en Havajo, Usono. Kiam li ripozis sur benko antaŭ hotelo, ĝuante la belan sunsubiron de Vajkikio, iu infano-knabo mal-sukcesis rekte marŝi sur malalta muro el rokoj, kaj falante, pied-batis lian portaĵon. El la pakaĵo ŝutiĝis panoj, kukoj, kaj biero. La knabo surpriziĝis pri tio, kaj ne konante kion fari, lin rigardis kun rondiĝintaj okuloj, kaj rigardis sian patron apudan. La patro diris al la knabo: “Vi faris mison al li, ne al mi!”

La knabo petis pardonon al s-ro K. “Min pardonu, sinjoro!” La patro neniel petis pardonon al s-ro (sinjoro) K.

Nun kiel vi sentas post tiuj rakontoj? S-ro(sinjoro) K. konfesis, eble japanaj parencoj petus pardonon anstataŭ li, ĉar infano, senrespondeculo, estas sub ilia protekto. Sed ne en Usono. Ankaŭ infano devas havi renpondon kiel unu indi-viduo, persono. La fraŭlino en la tramo ne estis edukata kiel indi-viduon.

Ĉi tio sentigas al ni la diferencon, malsamecon de kutimo, edukado kaj kulturo. Ofte estas dirite, ke cedemo de japanoj estas unu el virtoj. “Post vi” estas bona. “Mi unue”, “mi sola” estas tute abomeninda, ĉar tio “depuŝas” aliulojn, kion oni ne permesas por gardi harmo-nion kaj pacon inter si. Ni devas havi personan respondon kaj harmonion kun aliaj homoj. Estas malfacila afero, ĉu ne? Sed plejparto de japanoj vivas en tia edukado.

Parolante kun japanoj, se vi sentus ion strangan aŭ ne kompreneblan en ilia rakonto aŭ ago, bonvolu rememori supre diritan aferon kulturan.

Radio Ĉerizo finas ĉi-fojan programeron. Via mesaĝo kaj opinio estas bonvenigaj. Detalon vidu en la dosiero en nia retejo.

Nun, ĝis reaŭdo. De la suda Japanio parolis Belmonto.